



Komencanto

Kiel tio komenciĝis

Rakontas Kalle Kniivilä,
vaste konata E-aktivulo kaj
fondinto de la ret-paĝaro
"Libera Folio".
Fragmento el la traduko.
Eseo "Eĉ el sub la tero
aperas la vero".

Verkoj de niaj legantoj

Verkaj dediĉoj al naturo kaj
somero. Afrika fabelo
"La blindulo kaj la ĉasisto".

Gramatiko serioze kaj ŝerce

La 12-a gramatika leciono de
J-L Tortel.
Edifa fabelo "Vojo al sukceso".

Humuraj paĝoj

"Mi estas feliĉa pro..."
Ŝercoj kaj anekdotoj.

Originala filozofia fabelo

"La stulteta porkido".

Amuzaj ilustraĵoj

al konataj zamenhofaj
proverboj
"Enigmoj 2007".

Korespondu!



Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

Ĝoju al la Suno!

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2007

majo-junio

3 (65)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Carlisle, ML8 4QF
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812. Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Franco** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Sehwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresti, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japania Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalia** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Nun estas somero – la dolĉa sezono de la vivo. Plej taŭga momento ellasi la animon promeni: ja ankaŭ ĝi devas havi feriojn. Kaj ĝi pasigu ĉi tiujn fabelajn somerajn tagojn ĉu ĉe la maro, ĉu en la montoj, ĉu en amika medio de Esperanto-renkontiĝoj – laŭ sia plaĉo kaj en tuta libero. Ja libero estas siavice tre grava homa valorajo kaj tion atestas titolo de la reta esperanto-bulteno "Libera folio" kaj ĝia aŭtoro, redaktoro kaj vaste konata esperantisto Kalle Kniivillä, kiun ĉi-foje prezentas nia tradicia rubriko "Kiel tio komenciĝis". Do, vi povas konatiĝi kun ankoraŭ unu interesege historia de la esperantistiĝo, legi la ceseon pri nia E-informado, jam aperitan antaŭe en la revuo "Esperanto" kaj la fragmenton de la tradukita verko de Kalle, kiu nur devas aperi baldaŭ.

En "Verkoj de niaj legantoj" vin atendas verkaj dediĉoj al Somero kaj Naturo. Tio estas "Montoj vokas nin" – sukcesa laŭ ni debuto de komencanta aŭtoro Andrej Naumov el monta Altaja regiono kaj legendo pri bela lago Turgojak, situanta en Urala regiono de Rusio, kie loĝas ni, la redakcianoj: ĝin tradukis Raja Kudrjavceva. Alia verko direktas nin al Afriko. Fabelo "Blindulo kaj ĉasisto", tradukita de nia konstanta leganto kaj aŭtoro Martin Ginette, prezentas popolan saĝon de la afrikanoj. Sed en la spaco de gramatika rubriko daŭrigas transdoni al ni saĝojn prigramatikajn J-L Tortel. Apude kiel konsilo por bone kaj insiste lerni la lingvon sekvas la edifa fabelo "Vojo al sukceso", kiun speciale por legantoj de "K" sendis ĉina esperantisto, redakciano de "El Popola Ĉinio", kaŝanta sian nomon sub la pseŭdonimo *Bluĉielo*.

Sur la humuraj paĝoj ĉi – foje reaperas Sergej Paĥomov kun humor-filozofia kolekto "Mi estas feliĉa pro..." Legu ĝin kaj ankaŭ estu feliĉaj, ke vi havas tiun eblecon legi.

Post tradiciaj anekdotoj denove estas originala, ĉarma fabelo "La Stulteta Porkido" de nia aŭtorino el Israelo Luiza Carol, kies verkojn ni, redakcianoj, sukcesis tre ekŝati. Ĝenerale, tiun ĉi numeron de "K" karakterizas abundo de fabeloj, legendoj, fabeloj. Tio kompreneblas – ja tempo estas fabela – Somero... Guu ĝin!

la redakcio

Komencanto

2007 numero 3 // (65) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2007:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [ykud-a](#)

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Kiel tio komenciĝis

Finna esperantisto, loĝanta en Svedio; redaktoro de oficiala gazeto de TEJO, "TEJO Tutmonde" dum 1993-97; komisiito pri informado ĉe UEA en 1997-98 jaroj; estrarano de UEA pri informado en 1998-2000. Ekde 2003 redaktas la reĝan bulĉenon "Libera Folio", kiu li fondis kune kun István Ertl. Multe verkas originale kaj tradukas, nuntempe okupiĝas pri la traduko al Esperanto la Booker-premiitan rusan verkon «Чепухе на белом» ("Blanka sur la nigra") de Ruben Gallego.

Kalle Kniivilä

Marian... iĝis mia edzino, kaj Esperanto nia familia lingvo...

Mia unua memoro kun klara ligo al Esperanto rilatas al la mezo de la 1970-aj jaroj. kiam mi estis proksimume dekjara. Tiam mia familio - la gepatroj kaj miaj du pli junaj fratinoj - loĝis en la mineja urbeto Outokumpu en orienta Finnlando, kaj mi vizitadis la lernejon. eble la kvaran klason, eble la kvinan. tion mi jam ne memoras klare.

Mia patrino laboris en la urba biblioteko, kaj tie oni foje forigis malaktualajn librojn. Versajne lige kun tia kribrado de la librostoko mi ricevis dikegan porjunularan enciklopedion kun la nomo "Pikku Jattilainen". ("Giganteto"), kompilitan de la konata finna fotisto kaj esperantisto Vilho Setälä.

Tiu versio de la libro ŝajne estis eldonita jam fine de la 1940-aj jaroj, kaj multaj informoj en ĝi efektive estis tute malaktualaj. Mi memoras la surprizon de vendisto en fotovendejo, kiam mi volis aĉeti ruĝan lampon por riveligo de filmoj - ja jam en la 1950-aj jaroj oni ĉesis vendi filmojn, kiuj eltenas ruĝan lumon, modernajn filmojn oni devas riveligi en kompleta mallumo.


Spite sian malaktualecon la libro estis fascina legaĵo por dekjarulo. Mi studis la rusan alfabeton, inkluzive de kelkaj literoj kun la noto "forigita post la revolucio", kaj legis la ĉapitron pri la artefarita lingvo Esperanto. Kiam ni ricevis la hejmtaskon elpensi sekretan skribon, mi kombinis miajn sciojn kaj skribis la esperantlingvan frazon "La patro estas tre bona", trovitan en la enciklopedio, per rusaj literoj, de dekstre maldekstren. Komprenoble tio estis trompo, ĉar la frazo estis en fremda lingvo, sed mi fieris, ĉar neniu sukcesis deĉifri mian sekretan frazon.

Mi tre admiris mian patrinon, kiu ŝajnis scii ĉiujn fremdajn lingvojn: kaj la svedan, kaj la germanan, kaj la anglan. Eĉ pli mi admiris la lingvoscion de mia onklino Irmeli, kiu estis instruisto de la finna lingvo en hungara universitato. Foje ŝi vizitis nin en Outokumpu kaj havis longan telefonan interparolon kun Hungario. Mi kaŝe aŭskultis kaj miris, ke finno povas lerni tian strangan lingvon.

En la lernejo mi studis la anglan lingvon ekde la tria klaso, la svedan ekde la sepa, kaj en la oka klaso mi elektis studi la rusan, kiam la plej multaj el miaj klaskamaradoj preferis la alian alternativon, la germanan. Sed la lernado estis pena, kaj mi daŭre iom dubis, ĉu mi vere povos lerni paroli fremdan lingvon.

Ke tio efektive eblas, pri tio mi plene konvinkiĝis nur en 1981-82, kiam mi pasigis tutan lernejaron kiel interŝanĝa studento en Usono. En la biblioteko de la granda lernejo en Teksaso mi esploris la bretojn pri strangaj lingvoj, kaj denove trafis Esperanton. La esperantlingva libro pri la urseto Pu kun anglalingvaj klarigoj pri la lingvo estis interesa, kaj poste mi en alia Teksasa biblioteko trovis ankaŭ kaptan libron de la fama lingvisto Mario Pei pri la lingvoj de la mondo, kun ampleksa pritrakto de Esperanto.

Mia intereso estis vekita, sed vere mi komencis studi Esperanton nur iam aŭtune de la jaro 1982, dum mia unua jaro en la gimnazio de Outokumpu. Tiam mi trovis en la bretaro de la urba biblioteko tute novan vortaron finnan-esperantan-finnan. La vortaro ŝajne aperis iam printempe 1982, ĉar la antaŭparolo estas datita en novembro 1981, sed la pres-jaro estas 1982.



Ekde la jaro 1982 mi povas do kalkuli mian esperantistecon. Komence de la sama jaro mi iĝis 17-jara.

En la vortaro mi trovis ankaŭ utilajn adresojn, unuavice tiujn de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj de Libera Mendoservo Esperanta. De Mendoservo mi mendis la "Slosilon por finnoj", kaj parkerinte ĉiujn vortojn mi baldaŭ povis tralegi mian unuan esperantan libron, "La Verdano Raketon" de Jean Forge, reeldonitan de Fondumo Esperanto en Helsinko en 1974. Iom post iom mi komprenis, ke homoj efektive skribas kaj eĉ parolas tiun strangan lingvon, kiu komence estis ĉefe ia intelekta ludo por mi.

Mi jam ne tute certe memoras, kun kiu mi unue mem parolis Esperanton, sed kredeble estis Ulla kaj Martin Sather, gastigantoj de Pasporta Servo en Lund, Svedio, somere 1983. Tiam mi apenaŭ povis imagi, ke la urbo, kie mi komencis mian unuan esperantan vojaĝon, poste iĝos mia hejmurbo.

En 1983 mi evidente jam estis membro de Esperanto-Asocio de Finnlando, aŭ almenaŭ abonanto de ĝia organo Esperanta Finnlando, ĉar aŭtune mi partoprenis verkokonkurson de EAF. En Esperanta Finnlando 1/1984 aperis la jena informero (mia traduko el la finna):

"La limdato de la verko-konkurso por kurasoj kaj memlernantoj pasis fine de novembro. La prijuĝa grupo, en kiu estis Tuomo Grundstrom, Veikko Tikkanen kaj Osmo Buller, unanime opiniis plej bona la verkon "Esperanto kaj mi" de la signaturo Karlo Klingo. Senriproĉa lingvaĵo, klara esprimado, logika strukturo kaj intereso estis adjektivoj [tiele!], kiujn la prijuĝantoj uzis pri ĉi tiu verko. Malantaŭ la signaturo troviĝis Kalle Kniivila el Outokumpu.

Li studis la lingvon memstare dum jaro. La premio, partopreno en la Vintraj Tagoj en Oulu, do iras al li."

Mi efektive veturis al Oulu, per trajno, kaj kredeble la Vintraj Tagoj de EAF en 1984 estis la unua Esperanto-aranĝo kiun mi partoprenis. Tio mi tute certe faris mian unuan prelegon en Esperanto, kun la titolo "Pri la prononco de esperanto", kun minusklo, laŭ mia tiama prefero. Unu el la ĉefaj fontoj evidente estis la brila verko "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" de John Wells, kies unuan eldonon mi aĉetis en 1983 kaj ĝis nun konservas en mia biblioteko.

La samajn Vintrajn Tagojn partoprenis Zofia Banet-Fornalowa el Pollando, kiu poste ĉirkaŭveturis en Finnlando por prelegi. Ŝi venis ankaŭ al Outokumpu, loĝis hejme ĉe ni, prelegis en mia lernejo kaj en la urba biblioteko - kaj mi interpretis, unuafoje en mia vivo.

Poste dum la sama printempo, Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) pagis mian partoprenon en TEJO-seminario en Berlino. La veturo per trajno tra duona Finnlando, per ŝipo al Svedio, per trajno el Stokholmo al Berlino - kaj poste reen - daŭris preskaŭ same longe kiel la seminario. Somere 1984 mi partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Swanwick.

En 1985 mi ricevis stipendion de 500 finnaj markoj de FEJO por partopreni en Scienca Interlingvistika Simpozio apud Varsovio. La simpozio okazis dum la lastaj tagoj de aprilo, evidente jam post la abiturientaj ekzamenoj, al kies preparoj mi dediĉis la ĉefan parton de mia tempo dum tiu printempo. En mia posta raporto, aperinta en Kvinpinto kaj Esperanta Finnlando, mi skribis:

"La hotelo 'Sub Kverkoj' estis plenplena de milicanoj, kiujn oni kredeble venigis el ĉiuj partoj de Pollando Varsovion por la ratifikado de la *Varsovia traktato* kaj la unua de majo. Do, oni povas diri ke la simpozio okazis en kondiĉoj sufiĉe sekuraj."

En julio 1985, dum halto en Lund, survoje al la IJK kaj la UK en Germanio, mi renkontis Marian. Ŝi poste iĝis mia edzino, kaj Esperanto nia familia lingvo, unue la sola, poste unu el tri, kiam nia unua infano naskiĝis. Sed ĝis tiam restis preskaŭ dek jaroj.

Kalle Kniivilä [Svedio]

Ruben Gallego "Blanka sur la nigra".

Fragmento de traduko el la rusa Esperanten.

La libro devas baldaŭ aperi ĉe la eldonejo *Mondial*.

Heroo

Mi estas heroo. Esti heroo estas facile. Se vi ne havas brakojn aŭ gambojn, vi estas heroo aŭ mortinto. Se vi ne havas gepatrojn - fidu je viaj brakoj kaj gamboj. Kaj estu heroo. Se vi ne havas brakojn aŭ gambojn, kaj krome sukcesis naskiĝi orfa - jen la fino. Vi devas esti heroo ĝis la fino de viaj tagoj. Aŭ mortaĉi. Mi estas heroo. Mi ne havas elekton.

*

Mi estas knabeto. Nokto. Vintro. Mi devas atingi la necesejon. Voki onjon estas senutile. Estas nur unu solvo - rampi al la necesejo. Unue oni devas forgrimpi el la lito. Estas maniero tion fari, mi mem ĝin elpensis. Mi simple rampas ĝis la rando de la lito kaj turniĝas surdorsen, tiel ke mia korpo ruliĝas surplanken. Bato. Doloro. Mi rampas ĝis la pordo, kiu kondukas al la koridoro, puŝas la pordon per la kapo kaj rampas el la relative varma ĉambro eksteren, en la malvarmon kaj mallumon.

Nokte ĉiuj fenestroj en la koridoro estas malfermitaj. Estas malvarme, tre malvarme. Mi estas nuda.

Oni devas rampi malproksimen. Kiam mi rampas preter la ĉambro kie dormas la onjoj, mi klopodas voki helpon, mi frapas ilian pordon per mia kapo. Neniu respondas. Mi krias. Neniu venas. Eble mi krias tro mallaŭte. Dum mi rampas ĝis la necesejo mi definitive glaciĝas. En la necesejo la fenestroj estas malfermitaj, sur la fenestra breto kuŝas neĝo.

Mi atingas la noktovazon. Mi ripozas. Mi nepre devas ripozi antaŭ ol rampi reen. Dum mi ripozas, la pison en la noktovazo kovras glacio.

Mi rampas reen. Per la dentoj mi fortiras la kovrilon de sur mia lito, iel-tiel vindas min per ĝi kaj klopodas endormiĝi.

Kaj matene oni vestos min, oni veturigos min al la lernejo. En la leciono pri historio mi vigle rakontos pri la teruraĵoj en naziaj koncentrejoj. Mi ricevos la plej bonan noton. Mi ĉiam havas la plej bonan noton pri historio. Mi havas la plej bonan noton pri ĉiuj studobjektoj. Mi estas heroo.

Eĉ el sub la tero aperas la vero

Trompi estas ne nur malbele kaj malmorale, sed kutime ankaŭ simple malutile. Precipe en publika informado la plej grava principo devas esti ĉiam rakonti la veron, nur la veron, kaj laŭeble eĉ la tutan veron. Sed por tion fari, necesas unue koni la veron.

Tamen ni ofte trompas nin mem, kaj se ni trompos sufiĉe ofte, ni baldaŭ forgesos, ke estas trompo. Sed fiereco venas antaŭ la falo. Por eviti sintrompon, necesas honesteco, sincereco kaj malfermece kiel en la interna informfluo de nia Asocio, tiel ankaŭ en nia ekstera informado. Ni ofte kredas, ke eblas ĉirkaŭiri aŭ prisiŭlenti malfacilajn demandojn, sed preskaŭ ĉiam sincera respondo efiĝas plej bone.

Se oni parolas kun ĵurnalisto pri Esperanto, la plej ofta demando estas: "Kiom da homoj do finfine parolas la lingvon?" Respondi ne estas facile, respondi honeste eĉ malpli facile. Ja ne eblas simple bagateligi la demandon, dirante, ke ne eblas scii - ajna kompetenta ĵurnalisto komprenas, ke tio estas ruzo por eviti la respondon.

Kaj se ni estu honestaj, ankaŭ ne eblas citi la legendajn ciferojn pri dekoj da milionoj da esperantistoj. Sed kun trankvila konscienco eblas ripeti la respondon de profesoro Jouko Lindstedt al tiu demando: denaske Esperanton parolas proksimume mil homoj, same bone kiel sian denaskan lingvon eble dek mil, bone parolas kaj ĉiutage uzas la lingvon dekmilo da homoj, centmilo kapablas senprobleme uzi ĝin, kaj eble miliono iam studis Esperanton. Tia respondo donas konkretajn kaj laŭ mia opinio kredeblajn ciferojn, samtempe montrante, kial ne eblas doni precizan statistikon. Aldone oni sukcesas

montri al la demandinto, ke ankaŭ ekzistas denaskaj parolantoj de Esperanto.

Sed plej malfacila estas tamen la dua demando, per kiu la ĵurnalistoj kutimas daŭrigi la intervjuon: "Por kio do utilas Esperanto?"

Jes, por kio? Esperanton eblas lerni rapide - sed ĉu tio estas kialo lerni ĝin? Jes, estas vere, ke internaciaj organizaĵoj povus ŝpari amason da mono, se oni eĉ iomete uzus la eblecojn, kiujn proponas Esperanto, sed ĉu tio estas sufiĉa kialo por ke mi veturu al Esperanto-kongreso? Jes, Esperanto ebligas sendiskriminacian internacian interrilatadon, sed ĉu pro tio mi parolu esperanton hejme aŭ legu originalan beletron?


Estas facile paŭsi la stereotipajn respondojn el informiloj, kiuj mem estas paŭsitaj de pratemparaj informiloj, sed pli konvinkas sinceraj kaj honestaj respondoj pri personaj spertoj.

Kaj finfine ja la personaj spertoj ofte pli pezas ol teoriaj argumentoj. Pri tiuj spertoj ni rakontu, kiam ni informas pri Esperanto, ankaŭ pro tio, ke ĉiu homo estas vera spertulo, kiam temas pri la propraj spertoj, dum pri parkeritaj statistikaĵoj ni facile povas erari. Intervjuanta ĵurnalisto tuj rimarkos heziton aŭ malsincerecon, sed se ni rakontos pri aferoj, kiujn ni mem spertis, estos neniu kialo heziti aŭ esti malsincera.

Eksteruloj ofte vidas esperantistojn kiel duonfrenezajn misiulojn, kiuj insistas uzi sian strangan lingvon en ĉiuj eblaj kaj neeblaj situacioj. La publika bildo de la movado povus iĝi pli pozitiva, se ni estus honestaj, kaj rakontus ankaŭ al eksteruloj la veron pri ni mem. Sed unue ni devas mem ekkoni ĝin.

Kalle Kniivilä

Revuo Esperanto, oktobro 1998



fragmento el la bildo de Voroncova Nadeĵda [Kugan, Rusio]

Montoj vokas nin

Afanasij Nikitin
Esperantigis Andrej Naumov
[Novoaltajsk. Rusio]

Somero estas tempo de aktiva ripozo ĉe la naturo por ĉiuj. Kaj por tiuj, kiuj ŝatas okupiĝi pri tio konstante, kaj por tiuj, kiujn en alia sezono estas sufiĉe malfacile eltiri el la hejmo aŭ oficejo. Komencas vekigi deziron forveturi el la sufoka urbo, ekvidi ion novan, eksenti iom neordinaran.

Iuj preferas "friti" sian haŭton sur la varmegaj plaĝoj de Hispanio aŭ Turkio, aliaj ŝatas enprofundiĝi en arbaron kaj vagadi laŭ ties ombraj padoj, aŭskultante la birdajn trilojn, kliniĝante por forpreni de la arbustaj branĉoj sanigajn donacojn de la naturo aŭ haltas por simple stari, brakumante la belulinonbetulon aŭ sveltan trunkon de pino kaj akumuli de ili fortojn kaj juncon.

Iujn vokas la pintoj de montoj. Tie oni povas ekvidi kiel naskiĝas la nuboj. La acraj torentoj, turboj de la vento ĉe viaj okuloj kuniĝas en blanketajn bukajn masojn, "ŝafharoj de la nuboj". Evidente tial ĉi tie, sub ĉiu pinto, sinkaŝas pluvo, ĉiam preta abunde verŝiĝi super la kapojn de vojaĝantoj.

Vido – kvazaŭ el la aviadila fenestro, kiam la aviadilo alteriĝas aŭ ĵus ekflugis. El malproksimo ŝajnas, ke la vulkano rigardas el sub la brovoj. Sed vulkanoj ĉi tie for- estas. Aliokaze la pejzaĝo estus tute alia.

Kaj la steloj. Kiaj ĉi tie estas steloj! Plenaj ŝtonaj kampoj sur la tera ebenaĵo kaj, kiel respegulo, plenaj disŝutaĵoj de la stelaj ŝtone- toj sur la ĉielaj bedoj. "Kio supre, tio malsupre", kiel parolis la antikvaj homoj.

Niaj antikvaj montoj ankaŭ scias paroli. Per tamburanta eho, per kanto de vento, per trilo de rojo, fluanta laŭ la ŝultraj deklivoj de la ŝtonaj gigantoj. Aŭskultu atente kaj ili rakontos al vi pri la vivo kaj la esenco de la aĵoj pli bone, ol ajna scienca libro.


Kompreneble, ĉi tie povas esti malfacile. Foje eĉ tre. Ne facilas "la vojo al la nuboj", kiel ĉiam. Montogrimpado estas sufiĉe malfacila formo de ripozo. Sed tra bruego de falantaj ŝtonoj, bojo de vento oni sentas la vokon. Ĝi estas preskaŭ reala. Ĝi percepteblas tra la centoj da kilometroj, foje eĉ tra la jaroj. Ĉu vi aŭdas? La montoj vokas nin.

Kaj ĉiufoje reveninte hejmen, metinte ĉe la sojlo sian vagabondan sakon kaj apenaŭ brakuminte la edzinon, forigante ĉe la spegulo restaĵojn de la "holivuda" barbo mi krias: "Ĉu vi scias, kiel tie estas mirinde! Eble ni veturu tien por loĝi?"

Kaj post paŭzo sen aŭdi la respondon: "Ni konstruu la domon, al kroĉiĝu al Interreto kaj ekvivu! Kiel normalaj homoj!" Post la pordo de la banĉambro mi aŭdas ŝian ridon.

... Nun, kiam mi skribas tiujn liniojn, pense mi denove revenas tien, en niajn montojn... Kaj ŝanĝiĝas la vido, la bildo sur la monitoro, vidata kvazaŭ tra larmoj en lacaj okuloj, tremas kaj difektiĝas. Mi penas palpebrumi kaj subite denove vidas min tie, kie miaj amikoj marŝas laŭ apenaŭ videbla monta pado.

La blinda suno pafas el ĉiuj siaj tuboj, la same freneza, kiel super ĉiuj pintoj de la mondo, - kaj malvarma ŝanĝanta vetero portas kun si odorojn de proksima neĝo. Kaj mi nenien foriris! La montoj estas ĉiam kun mi. Ili simple ĉirkaŭas min kaj atendas.



Jurij Perevalov [Lesnoj, Rusio]

Natalia Ribalkina
esperantigis **Raja Kudrjavceva**
[Jekaterinburg, Rusio]

Turgojak estas bela lago en Urala regiono, kie ni loĝas. Multaj ŝatas viziti ĝin kaj ripozi tie somere. Evidentiĝis ke ekzistas eĉ interesa legendo, ligita kun tiu ĉi natura belaĵo.

Longe-delonge en la montaro de la Suda Uralo loĝis laga trolo kaj oni nomis lin Turgojak. Li estis tiom granda, ke elektis por loĝi la plej profundan lagon, sur kies fundo li dormis kaj pasigis vintrojn. Printempe Turgojak ĉiumatene leviĝis el la lago, superrigardis siajn bicnojn kaj kontrolis la ordon en la aferoj de la Arbaraj, Riveraj, Kampaj kaj Montaj Spiritoj. Li kontrolis ĉu trankvilas la ŝtonoj, ĉu la arbaj trunkoj sindirektas ĉielen, ĉu la nebuloj pleniĝas per herbaj odoroj. Kaj la plej ĉefa zorgo de Turgojak estis kontroli, ke malgrandaj viglaj estaĵoj, kiuj nomiĝas homoj, ne dislokiĝu sur la bordoj de lia lago, ne malbonigu ĝiajn pitoreskajn belaĵojn per fumoj de lignofajroj, ne malpurigu la akvon, ne forhaku la arbojn. Ĝuste pro tio li havis nomon Turgojak – Stop-Piedo.

Venas de tempo al tempo la homoj sur bordojn de la lago, provas enloĝiĝi, Turgojak tiumomente interkonsentas kun la najbaraj Spiritoj kaj kune ili penas forpeli la homojn: inundas per pluvoj homajn vilaĝojn, forblovas la varmon el iliaj loĝejoj, fortimigas la fiŝojn for de la bordo. Kaj la homoj foriris, ekvidinte, ke la Spiritoj ne bonvenigas ilian ĉeeston en ĉi lokoj. Kaj se troviĝis inter la homoj tre kuraĝaj kaj obstinaj, tiam Turgojak mem aperis el la akvo kaj ĝismorte timigis tiujn per sia terura aspekto.

Legendo pri Turgojak



Naila Sadretdinova [Voroneĵ, Rusio]

Kaj foje, dum unu el longaj vintroj, kiam Turgojak dormis kiel kutime sub la glacio, li ekvidis miraklan sonĝon. Kvazaŭ malgranda homa ido venis al la bordo de la lago. Turgojak sendis kontraŭ li venton, sed la infano nur ridis kaj ludis kun la vento. Turgojak sendis kontraŭ li malvarmon, sed la infano komencis salti kaj kuri kaj eĉ pli petoli. Turgojak sendis kontraŭ li neĝon, sed la infano plezure rigardis, kiel falas la neĝfloketoj.

Jam ne plu povis toleri Turgojak. Elrampis li el la lago cele timigi la infanon ĝis la morto. Li direktis la rigardon al la infanaj okuloj kaj subite ekvidis en ili ion tian, kio estis pli bela ol aŭroro kaj ĉielarko super la montoj, ol reflekto de la luno en la laga surfaco... Kaj vekiĝis tuj Turgojak, elakviĝis kaj ekvidis, ke jam delonge venis printempo kaj la homoj denove venis sur la bordojn de la lago kaj jam konstruis siajn loĝejoj.

Ekkoleris Turgojak, direktis kontraŭ la homoj ŝtorman venton kaj pluvojn-inundojn. Uragano kaj fulmoj rompis la homajn domojn

kaj la altaj ondoj dronigis ilin.

Disrompis kolere la laga trolo homan vilaĝon kaj foriris dormi sur la fundon de la lago.

Matene vekis lin la batoj de tamburoj, krioj de homoj kaj plaŭdoj de remiloj super lia kapo.

Malfermis la okulojn Turgojak kaj ekvidis, ke homo en la boato laŭte vokis la Spiritojn, levis super la kapo la homan idon kaj ĵetis tiun en la akvon ĉe la plej profunda loko. La homa ido dronis kaj trafis rekte en la manojn de Turgojak, kaj iliaj okuloj renkontiĝis.

Kaj denove, kvazaŭ en la sonĝo, ekvidis Turgojak en homaj okuloj tion, kio estis pli bela ol respiegulo de arboj kaj montoj, nuboj kaj steloj en la laga surfaco. Tiam prenis Turgojak la infanon en siajn grandajn manojn, levis lin el la akvo kaj metis sur la bordon, ĉe la loko, kie situis detruita homa vilaĝo.

Kiam la homoj en la boatoj alnaĝis al la bordo, ili ekvidis tie ludantan infanon kaj komprenis, ke la Gardisto de la lago perncesis al ili resti sur tiu ĉi loko.

el nekonata aŭtoro esperantigis
Martin Ginette [Soulxures-Moselotte, Francio]

La blindulo kaj la ĉasisto



Estis iufoje blindulo. Li vivis kun sia fratino, en modesta kabano, ĉe la rando de arbaro.

Tiu blindulo estis tre inteligenta. Liaj okuloj vidis nenion, sed li konis la mondon tiom bone kvazaŭ li havus okulon de linko.

Li sidadis apud sia kabano, kaj parolis kun la preterpasantoj.

Se homoj havis problemojn, ili petis konsilon de li, kaj la blindulo ĉiam trovis solvon.

Se ili volis scii ion, ili demandis la blindulon, kaj tiu-ĉi ĉiam trovis la taŭgan respondon.

La homoj kapskuis, mirigitaj.

— Blindulo, kial vi scias tiom da aĵoj?

Kaj la blindulo respondis:

— Ĉar mi vidas per miaj oreloj.

Iun tagon, la fratino de la blindulo enamiĝis en ĉasiston. Li estis el la najbara vilaĝo. Ili rapide geedziĝis, kaj la ĉasisto tiel iĝis la bofrato de la blindulo.

Kaj kiam la edziĝ-festo finiĝis, la ĉasisto venis loĝi en la kabanon kun la edzino. Sed la ĉa-

sisto trovis la blindulon ĝena, kaj ofte pensis, ke estus pli bone vivi sen li.

— Al kio utilas viro sen okuloj? - li diris.

Kaj la edzino respondis:

— Tamen, kara edzo, li konas la mondon tiom bone, kvazaŭ li havus okulon de linko.

La ĉasisto rid-eksplodis.

— Ha! ha! ha! Tiu viro vivas en la nigro, kion li povas koni? Ha! ha! ha!

Ĉiun tagon, la ĉasisto iris en la arbaron por instali kaptilojn. Li ankaŭ kunportis siajn lancojn kaj sagojn.

Kaj ĉiuvespere, kiam la ĉasisto revenis al la vilaĝo, la blindulo diris:

— Bonvolu kunpreni min por ĉasi en la arbaro.

La ĉasisto levis la ŝultrojn.

— Ne. Viro sen okuloj estas neutila.

Tagoj, semajnoj, monatoj pasis, kaj ĉiun vesperon, la blindulo petis:

— Bonvolu morgaŭ kunpreni min por ĉasi.

Kaj ĉiun vesperon la ĉasisto rifuzis.

Tamen, iun vesperon, la ĉasisto ŝanĝis ideon. Li estis ĝoja. La ĉasado bone sukcesis, kaj li revenis kun sufiĉe dika gazelo. Lia edzino kuiris ĝin tre sperte kaj, kiam li finis manĝi, li turnis sin al la blindulo, kaj diris:

— Nu, morgaŭ mi kunprenos vin por ĉasi.

fabelo de okcidenta Afriko

Tiel, la morgaŭan tagon, ili iris kune en la arbaron. La ĉasisto kunprenis siajn kaptilojn, siajn lancojn kaj siajn sagojn, kaj li kondukis la blindulon, tenante lin per la mano. Ili marŝis dum kvar horoj sub la arboj, kaj subite, la blindulo haltis, tirante la manon de la ĉasisto.

— Ĉt! estas leono proksime.

La ĉasisto rigardis ĉirkaŭ si, kaj vidis nenion.

— Estas leono, insistis la blindulo. Sed tio ne gravas. Ĝi bone manĝis kaj trankvile dormas. Ĝi ne faros malbonon al ni.



La bildojn sur la paĝoj faris Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Ili rekomencis marŝi kaj tiam, tute normale, ili trovis grandan leonon, kiu profunde dormis sub arbo.

Tuj kiam ili estis sufiĉe for de la leono, la ĉasisto demandis:

— Kiel vi sciis pri la leono?

— Ĉar mi vidas per miaj oreloj.

Ili denove marŝis dum kvar horoj, kaj subite, la blindulo tiris la ĉasiston per la mano.

— Ĉt ! estas elefanto proksime.

La ĉasisto rigardis ĉirkaŭ si, kaj vidis nenion.

— Estas ja elefanto, diris la blindulo, sed tio ne gravas. Ĝi banas sin en flako, kaj ne faros malbonon al ni.

Ili antaŭeniris kaj, tute normale, rapide trovis grandan elefanton, kiu vadis en flako, kaj spruĉis akvon sur sian dorson per sia rostro.

Tuj kiam ili estis for, la ĉasisto demandis:

— Kiel vi sciis pri la elefanto?

— Ĉar mi vidas per miaj oreloj.

Kaj ili daŭre marŝis en la profunda arbaro, ĝis kiam ili alvenis al senarba areo. La ĉasisto diris:

— Ni metos ĉi-tie la kaptilojn.

La ĉasisto instalas unu kaptilon kaj montris al la blindulo, kiel fari por instalati la duan. Kiam la kaptiloj estis pretaj, la ĉasisto diris:

— Ni revenos morgaŭ por vidi, kion ni kaptis.

Kaj ili revenis kune al la vilaĝo.

La morgaŭan matenon, ili el-litiĝis frue kaj reiris sur la sama pado. La ĉasisto proponis al la blindulo teni lian manon, sed la blindulo respondis:

— Ne, mi konas la vojon.

Ĉi-foje, la blindulo marŝis la antaŭa, kaj li ne stumblis sur la radikoj, nek sur la stumpoj de arboj. Li neniam voĵeraris.

Ili tiel marŝis ĝis la senarba areo, kie ili instalas la kaptilojn.

La ĉasisto tuj vidis, ke ili kaptis birdojn. Sed lia propra birdo estis malgranda kaj griza, dum tiu de la blindulo estis vera bunta mirindaĵo, verda, purpura kaj or-kolora.

— Sidiĝu ĉi-tie, li diris. Ni kaptis birdojn. Mi iras por preni ilin.

La blindulo sidiĝis surloke, dum la ĉasisto iris por zorgi pri la birdoj. Li pensis:

— Homo sen okuloj ne vidos diferencon.

Li donis al la blindulo la malgrandan grizan birdon, kaj gardis por si la superbelan birdon verdan, purpuran kaj oran. La blindulo prenis la malgrandan grizan birdon kaj ekmarŝis kun la ĉasisto. Revenvoje, la ĉasisto diris:

— Se vi estas tiom inteligenta, vi povas diri al mi, kial estas tiom da malbono kaj tiom da milito en la mondo.

La blindulo respondis:

— Ĉar ekzistas tiom da homoj kiel vi. Homoj, kiuj prenas tion, kio ne apartenas al ili.

Tiam la ĉasisto tre hontis. Li reprenis la malgrandan grizan birdon de la blindulo, kaj redonis al li la mirindan birdon verdan, purpuran kaj oran.

— Pardonu min, li diris.

Ili denove marŝis kaj subite la ĉasisto diris:

— Ĉar vi estas sufiĉe inteligenta por vidi per la oreloj, diru al mi, kiel povas esti tiom da amo kaj feliĉo en la mondo.

Kaj la blindulo respondis:


— Ĉar la mondo plenas de homoj kiel vi, kiuj korektas siajn erarojn.

Ili denove marŝis kaj fine alvenis al la vilaĝo.

Depost tiu tago, ĉiufoje kiam la ĉasisto aŭdis iun demandi:


— Blindulo, kial vi konas tiom da aĵoj? - li tenis la blindulon ĉe la ŝultroj kaj respondis:

— Ĉar li vidas per siaj oreloj kaj aŭdas per sia koro.



Ni daŭrigas publikadon de gramatikaj lecionoj de J.-L. Tortel.

Gramatika leciono № 12



Bonan tagon, geamikoj de Komencanto !

Agrabla estas gasto, se ne longe li restas (3)

Tion vi povos diri eĉ antaŭ via bo-patrino, kiu venis por gardi vian bebbon: ŝi ne rajtos koleri kaj foriri, ĉar vi diris: li, kaj ne ŝi.

Long-e signifas: dum longa tempo. Kun la fino -e, vorto donas ideon de eco, maniero, loko, tempo, kvanto. Tion ni lernas tuj ĉe la komenco de nia intereso al Esperanto:

Aŭskultas prudente, kiu aŭskultas atente (136)

Oni nomas tian vorton adverbo, el la latina *ad verbum*, tio estas apud verbo (fakte adverbo povas rilati ankaŭ al adjektivo, al alia adverbo, aŭ eĉ al nomo).

La fino en -e por adverbo estas ofta en latinidaj lingvoj (latine: certe, vere - kiel en Esperanto) kaj en slavaj (pole: dobrze, bone; wczesnie, frue).

Ni ne forgesu, ke se adverbo estas ĝenerale ne-varia, ĝi tamen prenas -n kiam ĝi indikas direkton:

Mensogo malproksimeN ne kondukas (1513)

Iam oni konsideris multajn aliajn vortojn adverboj: kelkajn tabel-vortojn (aŭ korelativojn) kiel *iam, ĉie, kial, tiel*; aŭ vortojn kiel *nur, ne, ĉu, morgaŭ* - imite al la naci-lingvaj gramatikoj. Sed gramatiko evoluis, malfacile montrigis pravi ilian adverb-econ, kaj oni nun emas nomi ilin morfemoj aŭ partikuloj (oni povas kompari tiujn eks-adverbojn en la malnova PIV kaj en la nova NPIV). Nun adverbo esence estas -e vorto.

Ĉar oni povas al-meti -e post ĉiu radiko (la kerno de la vorto en Esperanto) ni ĝuas multe pli facilan uzon de adverboj, ol en etnaj lingvoj, kaj oni ne bezonas insisti, ke tio prezentas grandan fleks-obl-econ al nia internacia lingvo. Sed ĝuste pro tiu ofta uzo, la popol-anoj, kiuj ne ĝuas tiun facil-econ en sia etna lingvo riskas erar-eti en Esperanto, ekzemple inter uzo de adjektivo kaj uzo de adverbo. En tri kazoj oni uzu en Esperanto adverb-on anstataŭ adjektiv-on:

1° kiam la verbo ne havas subjekton (tio estas iu aŭ io aganta per la verbo):

Estas varme, hodiaŭ! (neniu subjekto)

2° kiam la subjekto estas infinitivo (verbo kun -i):

Resti kun leono estas danĝerE (Fundamento, §7, 5): la subjekto estas resti; sed oni dirus: restado kun leono estas danĝerA, ĉar la subjekto estus restado:

3° kiam la subjekto estas tuta frazo:

Estus tre belE, ke mi iru al la fonto - ironias la malbona filino en la fabelo "La feino" de "La Fundamento".

Alia afero. Ni skribis ĉi-supre: "pli facilan uzon, ol en etnaj lingvoj "Pli, ol" indikas komparon de du malsamaj aferoj; la unua superas la duan:

Pli bona amiko intima, ol parenco malproksima (1947)

Ni povas al-glui *mal* al pli (sed ol restu ĉiam sola):

Malpli da havo, malpli da zorgo (1455)

Pli kaj malpli povas aranĝ-iĝi kun la paro *ju des* (el germana de-veno) kiu indikas paralelan ŝanĝon:

Ju pli da donoj, des pli da amikoj (789)

Ju pli da bruoj, des malpli da ĝuoj (788)

Feliĉe por nia memoro Esperanto ne en-tenas neregulajn kompar-ilojn, kiel multaj etnaj lingvoj: germane gut, besser; hispane bueno, mejor, ktp. Ni tamen sciu mir-ind-aĵon. Inter ambaŭ mond-militoj la Societo de Nacioj mal-akceptis Esperanton pro politikaj motivoj (kelkaj registaroj ĉrepece la Franca ĉrepre volis konservi sian lingvan superecon). Tiam iuj homoj naive kredis, ke la kialo estas la ne-sufiĉa imito de Esperanto al etnaj lingvoj. Ili do fabrikis lingvajn projektojn, kun en-meto de ne-regulaj kompar-iloj, vane esperante pli bonan akcepton, ekzemple: parve (eta), minor (pli eta); bon (bona), melior (pli bona), ktp!

Ni finu per kelkaj afiksoj, tio estas deriv-iloj: ili al-met-iĝas al radiko kaj ŝanĝas ties sencon:

Forgû feron dum ĝi estas varm-ega (616)

Varm-ega ne estas nur tre varma, ĝi estas tiel eksterordinare varma, ke ĝi iĝis mola kaj brile ruĝa: ĝi kvazaŭ ne plu estas fero! Same dom-ego ne estas nur granda domo, eĉ tre granda: ĝi estas io alia, unu el tiuj konstru-aĵoj, kie vivas centoj, foje miloj da homoj.

Pro amo al la kandelo, kato lekas la kandel-ingon (2097)

Ing-o indikas partan ten-ilon: *floro, floringo; flago, flagingo; glavo, glavingo*, ktp.

Male uj-o montras totalan en-met-ilon :

Abelujon ne incitu, amason ne spitu (1)

(*Abelo, abelujo; sukero, sukerojo, supo, supujo*, ktp. *Inciti = koler-igi; spiti = provoki, defii; Spit ! = ekkrio por provoki*).

Komence de Esperanto oni uzis "-ujo" ankaŭ por land-nomoj: Ruso, Rusujo; Franco, Francujo. Poste aperis "-io" por cviti "-ujo": Aŭstrio, Svedio. Ja gajno de unu litero kaj en kelkaj kazoj pli da simil-eco al la naci-lingva nomo, ekz.: Italio. Ĉu granda progreso? Se ambaŭ ne plaĉas al ni, eblas uzi "-lando": Danlando, Svislando. Tio estas iom longa, sed en kelkaj kazoj tio proksimiĝas de la loka nomo ekz.: Nederlando. Ni tamen laŭ-plaĉe decid-iĝu por unu el la tri eblaj manieroj, ĉar:

De elekto tro multa plej malbona rezulto ! (286)

Pli ĝena povas esti la uzo de "-ujo" ankaŭ por arboj: pom-ujo, arbo kun pomoj; pirujo, arbo kun piroj. Sed ĉu do pom-ujo estas vazo kun pomoj aŭ arbo kun pomoj? Oni do nun preferas: pom-arbo, pir-arbo - kiam estas risko de eraro.

Ĉiel, el iu ajn pomujo ni manĝu pomojn, kiam ni povas, tio estas bona por nia farto:

An apple a day keeps the doctor away

diras angla proverbo, kiun Zamenhof ŝajne ne konis: oni povus traduki:

Pro pomo ĉiutaga doktoro ja senpaga

Ĉiu el ni rajtas kompreneble proponi pli taŭgan tradukon !

Ĝis la venonta babileto!
Johan-Luko Tortel

Tiun mallongan, sed instruan fablon sendis speciale por "Komencanto" ĉina esperantisto, laboranta en "El Popola Ĉinio" (nun jam reta esperanto-gazeto www.espero.com). Li petis publikigi lian materialon sub pseŭdonimo Bluaĉielo.

Atente legu la fablon, estu persistemaj en la lingvolernado kaj rikoltu meritajn sukcesojn!

Bluaĉielo [Ĉinio]

Vojo al sukceso

Iu persono demandis saĝulon:

— Pardonon! Kiel oni povas sukcesi?

La saĝulo ridis kaj donis al li arakidon, dirante:

— Pinĉu ĝin forte.

Tiu persono faris tion. La ŝelo rompiĝis kaj arakidsemo restis.

— Frotu ĝin! – la saĝulo diris.

La demandinto frotis la arakidsemon laŭ la postulo de la saĝulo. La ruĝa haŭto forfalis kaj la blanka frukto restis.

— Plu pinĉu ĝin per manoj, - diris la saĝulo.


La persono pinĉis ĝin forte refoje, sed ne povis rompi ĝin.

— Plu frotu ĝin per manoj - la saĝulo diris.

Certe, nenio falis.

— Kvankam la arakido plurfoje suferis pro atakoj, tamen ĝi havas firman kaj neflekseblan kernon, tio estas la sekreto de la sukceso, - resumis la saĝulo.

Ĉiuj sukcesantoj havas neflekseblan persistecon, tio estas fonto de sukceso.



Ŝulepov Aleksandr [Verhoturje, Rusio]

Sendis al la redakcio
Paĥomov Sergej
[Kirov, Rusio]



mi estas feliĉa pro...

Pro la impostoj, kiujn mi pagas, ĉar tio signifas, ke mi havas laboron...

Pro la purigado, kiun mi faras post festo, ĉar tio signifas, ke min ĉirkaŭis amikoj...

Pro la infano, kiu plendas pro lavenda manĝilaro, ĉar tio signifas, ke li estas hejme, sed ne surstrate...

Pro miaj vestaĵoj iom tro streĉaj, ĉar tio signifas, ke mi satmanĝas...

Pro la herbobedo, kiu bezonas tondadon, pro la fenestroj purigendaj kaj plankoj lavendaj, ĉar tio signifas, ke hejmon mi posedas...

Pro la plendoj, turnataj al niaj registaroj, ĉar tio signifas ke ni rajtas libere paroli...

Pro la lasta libera loko, kiun mi trovis malproksime en la vendeja aŭtejo, ĉar tio signifas, ke mi kapablas paŝi...

Pro mia multekosta hejtfakturo, ĉar tio signifas, ke mi en-varme loĝas...

Pro la homo, kiu tro laŭte parolas malantaŭ mi, ĉar tio signifas, ke mi aŭdkapablas...

Pro la amaso de malpuraj vestaĵoj purigendaj kaj gladendaj, ĉar tio signifas, ke mi havas la vestaĵojn por surmeti...

Pro la lacego kaj muskola doloro fine de la tago, ĉar tio signifas, ke mi kapablas forte fizike labori...


la bildojn faris Timur Halilov
[Jekaterinburg, Rusio]

Pro la sonorado de la vekhorloĝo, ĉar tio signifas, ke mi vivas ...

Pro ĉiuj retmesaĝoj, kiujn mi ricevis, ĉar tio signifas, ke mi havas amikojn, kiuj pensas pri mi!

kaj fine...

Pro tiu ombro, kiu gardas min ĉe la laborejo, ĉar tio signifas, ke mi estas en plenlumo...



Jakovleva Jelena [Arhangelsk, Rusio]

Paradokso

Konversacias du infanoj:

— Ne komprenas mi miajn gepatrojn. Dekomence ili instruis min paroli. Sed nun postulas silenti!

*

Plej precize

Loterio estas plej preciza maniero kalkuli kvanton da optimistoj.

*

Ora regulo

Neniam edziĝu al virino, kun kiu vi povas vivi. Edziĝu nur al tiu virino, sen kiu vi ne povas vivi.

*

Rimarkoj

Ju malpli multe oni pensas, des pli multas la samideanoj.

*

La plej justeca societo konsistas el unu homo.

*

Hieraŭ mi serĉis justecon. Hodiaŭ serĉas alian laboron.

Kolektis kaj esperantigis: **Viktor Solovjev** [Osa, Rusio]

Kiom ruza

Unu ĉefadministranto demandas la alian:

— Kiel vi atingis tion, ke viaj kunlaborantoj ne malfruas al la laboro?

— Estas tre simple. Ĉe mi laboras 30 personoj, sed lokoj por parki aŭtomobilojn estas nur 20.

*

Serpento

— Kiel rampas ebria serpento? — Rekte!

*

La nigra kvadrato

Evidentiĝis, ke Kazimir Maleviĉ pentris nefunkciantan televidilon.

*

La plej bona

Ĉe maljuna viro mortas edzino. Ŝi demandas lin antaŭ la morto:

— Kara, diru al mi, ĉu vi edziĝos al mia ĝemel-fratino?

— Trankviliĝu, karulino. Certe mi ne edziĝos al ŝi.

— Kial?

— Vi ja scias, ke ne ekzistas virino pli bona ol vi. Sed la saman mi ne volas...

*

Mi ne venos

— Leŭtenanto, vi estas timulo kaj aĉulo. Mi vokas vin al duelo.

— Mi ne venos!

— Kial?

— Ĉar mi estas timulo kaj aĉulo.

Strangaj ŝtrumpoj

— Kial sur la ŝtrumpoj, kiujn vi vendas, estas numero 36-46? Ĉu ili estas gumaj?

— Ĉiuj aĉetas kaj ne demandas, sed se vi interesiĝas, mi klarigas – la ŝtrumpoj vendiĝas pare – unu de 36-a numero, la alia – de 46-a.

*

Statistiko

Estas konate, ke unu cigaredo kurtigas homan vivon je 10 minutoj, 100 gramoj da brando kurtigas la vivon je 20 minutoj... Unu labora tago kurtigas la vivon je 8 horoj!

*

Konsideru

Ĉiu virino devas memori, ke viro serĉas akompanantinon por sia vivo, sed ne la majstrinon.

*

Peto kaj plenumo

— Dio, faru tiel, ke morgaŭ estu sabato!

— Bone. Mi plenumos vian peton... vendrede.

*

Demokratio

— Kiam naskiĝis demokratio?

Respondo:

— Kiam la Dio venigis Adamon al Eva kaj diris: "Elektu!"

*

Amiko


— Vasja, mortis mia onklo. Ĉu vi povas doni al mi nigran kostumon, mi memoras, vi ja havis tian...

— Jes, kial ne, jen prenu!

Pasis tempo. Vasja denove renkontas la amikon:

— Pasis jam unu monato. Kie estas mia nigra kostumo?

— Mi ja diris al vi, ke mortis mia onklo. En tiu nigra kostumo ni lin entombigis.




Naila Sadretdinova [Voronej, Rusio]

Luiza Carol [Kiriati-Yam, Israelo]

La stulteta porkido

Nia aŭtorino el Israelo Luiza Carol ŝatas verki originalajn fabelojn. Ĉi-foje ŝi verkis la fabelon, reflektantan la proverbon, kiun vi trovos antaŭ la teksto.

Gardu vin kontraŭ aŭto de antaŭe, kontraŭ ĉevalo - de malantaŭe, kaj kontraŭ stultulo - de ĉiuj flankoj.



Foje, en iu arbaro, oni organizis Grandan Karnavalon de Bestoj. Ĉiuj partoprenontaj bestoj devis iri dupiede kaj vesti sin kiel homoj, por tiu okazaĵo.

La dato de la karnavalo proksimiĝis. Kaj arbaraj bestoj kaj dombestoj preparis sin por tiu evento. Ankaŭ iliaj malproksimaj familianoj kaj ĝeamikoj el aliaj landoj preparis sin ekscitite.

Kvar ĝeamikoj ege emociiĝis pri la karnavalo, kaj komencis prepariĝi kune delonge antaŭ la evento. Tiuj ĝeamikoj estis: la Simiino, la Urso, la Kanguruino kaj la Hundo.

Fin-fine, venis la tago de la Granda Karnavalo. La kvaropo vestis sin per belaj roboj, pantalonoj, ĉapeloj kaj juveloj. Ili kune foriris dupiede al la rando de la arbaro, kie la karnavalo devus okazi.

Laŭ la vojo ili renkontis plorantan Porkidon.

— Ankaŭ mi volus partopreni la Grandan Karnavalon, - diris la Porkido suspirante. - Sed mi ne havas vestojn... kaj krome, mi ne scipovas iri dupiede...


La kvar ĝeamikoj kompatis la Porkidon. Ili decidis kaŝi lin inter si, kaj tiel partopreni la karnavalon kune kun li.

Kaj jen la kvinopo daŭriganta sian iradon al la rando de la arbaro: la Simiino antaŭ la Porkido, la Urso malantaŭ la Porkido, la Kanguruino maldekstre de la Porkido kaj la Hundo dekstre de la Porkido. Oni apenaŭ povis vidi la Porkidon inter ili.

Subite, la kvinopo ekvidis sur la vojo malpuran marĉeton. La Simiino lerte saltis super la marĉeton, la Kanguruino iris apud la maldekstra flanko de ĝi, la Hundo apud la dekstra flanko de ĝi, la Urso malrapide venis post la Porkido... Kaj kion faris la Porkido? Kiam li vidis la marĉeton, li ĝoje ekkris "Ho-la! Hop!" kaj saltis en ĝin: FLOOOP!!!

La Porkido malpurigis sin per koto, malpurigis la Simiion antaŭ si, la Urson malantaŭ si, la Kanguruinon maldekstre de si kaj la Hundon dekstre de si.

Tiutage la kvinopo ne povis partopreni la Karnavalon.



Bildojn por la paĝo faris **Raja Kudrjavceva** [Jekaterinburg, Rusio]

Ŝercaj ilustraĵoj al konataj zamenhofaj proverboj

Karaj amikoj!


En "Komencanto-6-2006 aperis kelkaj ŝercaj ilustraĵoj al proverboj el fama zamenhofa Proverbaro.

La ideo plaĉis, ni ricevis bonajn reĥojn. Arina Osipova el Jekaterinbu (Rusio), trafoliumante kajerojn de "K" ekde 1998, trovis plurajn bildojn, kiuj povus ilustrati ankoraŭ kelkajn zamenhofajn proverbojn. Bonvolu vidi.

La redakcio denove invitas vin partopreni en tiu amuzaĵo - trovu bildojn kaj proverbojn, kiuj reciproke ilustras unu la alian. Sukcesojn!

la red.

Kiu perdis la kapon,
ne bezonas jam ĉapon



bildo de Bill Thorne [Londono, Britio]

Al buŝoj de oni neniu povas ordoni



bildo de Ŝulepov Aleksandr [Verhoturje, Rusio]



bildo de Victoriano Almenures [Havano, Kubo]

Ju cerbo pli prudenta, des
lango pli silenta

Enigma-2007

Karaj legantoj! La redakcio petas pardonon pro la preterlasitaj eraroj en la krucenigmo "Bestoj" en Komencanto-1-2007.

Ĉar mankas senco deĉifri la taskon "Bestoj", ni decidis nuligi la rezultojn de ĝi kaj ne plu daŭrigi konkurson "Enigmaj-2007". Bonvolu serĉi solvojn de taskoj sen konkursi, por via propra plezuro.

Respondoj al Komencanto-2007-2 "Ĉelaro": 1. Pekino 2. Eskudo 3. Frosto 4. Utopio 5. Kankro 6. Nuncio 7. Betono 8. Niobio 9. Teatro 10. Zibelo 11. Ortilo 12. Kolono 13. Limono 14. Blonda 15. Budito 16. Skolto 17. Demono 18. Radono 19. Ŝtormo 20. Omleto

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 47 jara ŝoforo de ambulanco, E-komencanto. Int: politiko, sociologio, scienc-fikcio, scienco, saneco. Se vi venos al Hispanio ferii, mi volas trinki kafon kun vi.

Andreo Izquierdo

Madrido

Hispanio

zocialisto@gmail.com

Saluton, mi studas en universitato. Int: biciklo, geografio, skiado, naĝado. Mi volas korespondi kun amikoj mondscale. Tial skribu!!! Mi ĝojos.

Marie Sucha

K Sokolovne 170, 675 73

Rapotice

Ĉeĥio

mariess@seznam.cz

Mi estas studento de ekonomio kaj deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj mondpartoj.

Luis Rodriguez Pablo

Santiago de Kubo

Kubo

paco59@medired.scu.sld.cu

Serĉu

korespondamikojn ĉe
www.Edukado.net

Saluton! Mi estas progresanta 28-jara esperantisto, mi loĝas en Siberio. Certa parto de la esperantistaro memoras min kiel Kostik Vento, ĉar mi muzikis en IJK-2004 en Rusio. Kvankam mi estas jam sperta esperantisto, mi mal multe korespondis kun alilandanoj, do mi ŝatus ekhavi ankaŭ tian sperton. Int: Esperanto, muziko (ankaŭ verkado), ekologio, entreprenado, lingvoj, dancoj (kontakta improvizo) k.m.a. Atende kaj amike.

Konstantin Hlyzov

Irkutsk

Rusio

kostik@ikso.net

Mi estas progresanta esperantistino, profesia instruistino. Int: turismo, literaturo, religioj kaj multo alia. Mi volus amikiĝi kun personoj de diversaj landoj kaj kontinentoj. Sendi mesaĝojn, diskuti pri ĉio, kompari morojn kaj kulturojn, babili tutajn noktojn kaj eble fine renkontiĝi. Amike,

Ursula Kwasniewska

Lund

Svedujo

urszula.kwasniewska@telia.com



Korespondanta Servo de JEI

Se vi volas korespondi kun japano(in)oj, turnu vin kun konciza prezento al Korespondanta Servo de Japana Esperanto-Instituto: Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to, 162-0042, Japanio jei@mre.biglobe.ne.jp

Saluton! Mi nomiĝas Sébastien. Mi lernas Esperanton. Mi volas korespondi. Mi havas 12 jarojn. Int: kino, muziko.

Sebastien Moure

Tuluzo, **Francio**

seb.moure@laposte.net

Mi estas 11 jara knabino, komencanto. Mi ŝatas legi. Mi volas kor. tutmonde.

Beth DICKEY

Halifax, Nova Scotia,

Kanado

bethand@student.ednet.ns.ca

Mi estas 21 jara studento, komencanto. Mi studas en la universitato de Antananarivo en la scienca fakultato. Mi estas malagasao. Mi deziras korespondi kun Japanaj, Usonaj, malagasaj, aŭstraliaj kaj francaj esperantistoj, kiuj aĝas de 16 ĝis 35 jaroj. Mi ŝatas legi librojn, ludi gitaron kaj korbopilkon, promeni kun miaj geamikoj, rigardi filmojn kaj aŭskulti muzikon.

Charly Andriamihaja

Lot II A 119 RB Nanisana, MG 101 Antananarivo

Madagascar

dapouni@yahoo.fr

Mi estas progresanta esperantistino, volas korespondi kun interesiĝanto pri Spiritismo, libroj kaj projekciologio. Ne gravas la sekso kaj jaraĝo de la korespondanta samideano. La ĉefa celo estas trovi amikojn kun samaj ideoj. Int: Projekciologio, spiritismo.

s-ino *Marcia Castro*

Soares

Praia Grande SP

Brazilo

marciaesperanto@terra.com.br

36-jara virino volas korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

Jelena Jakovleva

Partizanskaja, 51-1-196

Arhangelsk,

103059

Rusio

Mi estas 58 jara virino, komencanto. Mi parolas anglan kaj francan lingvojn. Int: naturo, politiko, poŝtkartoj, lingvoj, arto, teatro, vojaĝoj.

Olga Beljaeva

St-Peterburgo,

Rusio

olgabel21@bk.ru

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

